

V-18679/1938

ESPERANTISTA AKADEMIO

Esperanto

JARLIBRO

DE LA

LINGVA KOMITATO

kaj de ĝia Akademio

1938

Prof. MIECZ. SYGNARSKI

Ex Libris

L. 133

Prof. Sygnarski

OOSTDUINLAAN 32

HA.GON EDERLANDO

ENHAVO

	Paĝoj
Raporto de la Prezidanto de la Lingva Komitato	1
Raporto de la Direktoro de la Sekcio „Komuna Vortaro”	14
Raporto de la Direktoro de la Sekcio „Teknikaj Vortaroj”	16
Raporto de la Direktoro de la Sekcio „Gramatiko”	19
Raporto de la Direktoro de la Sekcio „Kontrolo”	24
Nomaro kaj adresaro de la L. K.-anoj	29
L. K.-anoj laŭ la lingvoj kaj ilia elirjaro	34
Akademio	38
Mallonga historio de la Lingvaj Institucioj	39
Normigitaj naciaj diplomoj	41

RIMARKO. — La opinioj, esprimitaj en la diversaj raportoj, estas la personaj opinioj de la verkintoj, pri kiuj la Lingva Komitato kiel tuto ne estas respondeca.

Raporto de la Prezidanto de la Lingva Komitato 1938

I. — ADMINISTRA FUNKCIADO

a) Membraro de la Lingva Komitato.

Laŭ la listo, publikigita en la antaŭa Jarlibro la Lingva Komitato enhavis 105 membrojn. La L.K. funebre memoras, ke la 1-an de Oktobro 1938 mortis ĝia fidela ano S-ro *Tellini* en Udine. Du membroj, S-ro *E. Spiridoviĉ* en Kiev, U.S.S.R. kaj Prof. *B. Migliorini* en Firenze propravole ekŝiĝis el la Komitato kaj tiel la nombro de la anoj de la L.K. reduktiĝis al 102. La nomoj kaj nunaj adresoj de la membroj estas troveblaj en la listo sur paĝo 29 de ĉi tiu Jarlibro. De 4 membroj, nome de S-roj *A. P. Andrejev* en Moskvo (U.S.S.R.), *Eŭg. Miĥalski* en Stalino-Donbas (U.S.S.R.), *K. Niŝimura* en Kameoka (Japanujo) kaj *Jan van Schoor* en Antwerpen (Belgujo), la adresoj ne estas notitaj, ĉar sendaĵoj de la L.K. al iliaj antaŭaj adresoj revenis kiel nelivereblaj. Mi estos danka al ĉiu, kiu povos informi min pri la nunaj adresoj de tiuj Lingva-Komitatanoj.

b) Elektoj por la Lingva Komitato.

Per cirkulero N-ro 15, sendita al la Lingva-Komitatanoj en Aprilo 1938 la membroj estis

invitataj voĉdoni pri la reelekto de la L.K.-anoj, kies naŭjara periodo finiĝis en 1938 kaj kies nomoj estis prezentataj en Julio 1937. Ĉar la nombro de la L.K.-anoj estas ankoraŭ pli ol 100, la nombro fiksita por la estonteco, neniu nova kandidato povis esti proponata. La rezultato de la voĉdonado estis kontrolata de mi en ĉeesto de S-roj A. Cseh, Akademiano, kaj H. J. Bulthuis, L.K.-ano. Envenis entute 50 voĉdoniloj, el kiuj 1 estis nevalora. La nombro de la voĉoj, kiujn ĉiu kandidato ricevis estas la jenaj:

<i>Th. G. Bailey</i>	48
<i>G. Demidjuk</i>	37
<i>A. Esselin</i>	43
<i>N. Hohlov</i>	42
<i>E. Kühnl</i>	45
<i>N. V. Nekrasov</i>	44
<i>D-ro E. Privat</i>	48
<i>S. Rublov</i>	39
<i>F-ino A. Shafer</i>	41
<i>P. Stojan</i>	45

Ĉar la absoluta plimulto estis 25 voĉoj, ĉiuj estas reelektitaj.

c) Membraro de la Akademio.

La nomoj de la Akademianoj estas presitaj en la listo de la L.K.-anoj sur paĝo 29 per dikaj literoj. Krom tio ili estas troveblaj en aparta listo sur paĝo. 38. Du lokoj estas nuntempe vakantaj. La Akademio estos konsultata pri la demando, ĉu ĝi inter la regulaj elektoj deziras plenigi tiujn du lokojn. (art. 14 de la Statuto).

d) Sekretario-kasisto.

Kiam en 1937 mi transprenis la prezidantecon de la Lingva Komitato el la manoj de mia antaŭulo, S-ro *Rollet de l'Isle*, ŝajnis neoportune, ke S-ro *de Lajarte*, kiu dum multaj jaroj plenumis la oficon de Sekretario-kasisto, daŭrigu tiun funkcion, ĉar la granda distanco inter lia loĝloko kaj mia mal-ebligis fakte la necesan daŭran kontakton. Ĉar samtempe la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto en Hago disponigis al mi — eĉ senpage — siajn maŝinojn kaj aliajn rimedojn por la multobligo kaj dissendo de la cirkuleroj de la L.K., mi opiniis, ke la posteno de Sekretario-kasisto povis provizore resti neokupata. Kelkajn taskojn, ekz. la administradon de la finacaj rimedoj de la L.K. mi povis ĝis nun mem prizorgi.

e) Financa raporto.

La listo de la en - kaj elspezoj de la L.K. dum la administra jaro 1937—1938 (ĝis fino de Julio) estas donata en la sekvonta bilanco:

<i>Enspezoj.</i>	
Saldo ricevita de S-ro <i>de Lajarte</i>	f 12,00
Subvencio de Federacio de Lab.	
Esp., 1937	9,00
Subvencio de Internacia Esp. Ligo,	
1937	„ 219,33
Subvencio de Federacio de Lab.	
Esp., 1938	„ 10,00

f 250,33

Elspezoj.

Papero, kovertoj, stenciloj k.t.p. f	29.03 ⁵
Afranko de cirkuleroj, sciigoj „	13,76
Afranko de leteroj „	10,14 ⁵
Diversaĵoj „	1,25
Saldo „	196,14
	<hr/>
	f 250,33

f) Oficialaj Sciigoj kaj Cirkuleroj.

Oficialaj Sciigoj de la Akademio N-roj 13 kaj 14 estis dissendataj al la Esperanta Gazetaro respektive en Oktobro 1937 kaj en Februaro 1938.

La L.K.-anoj ricevis en Aprilo 1938 cirkuleron N-ro 15 kaj en Julio 1938 cirkuleron N-ro 16 kaj krom tio diversajn artikolojn de kolegoj, kiuj esprimis sian opinion pri la reaktualiĝinta demando pri la gramatika karaktero de la radikoj (vidu sub: Lingva funkciado).

II. — PRILINGVA FUNKCIADO

„La Esperantista Lingva Komitato estas komisiita por zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evolucion”.

Tiel, per malmultaj vortoj la 1-a artikolo de la Statutoj de la Lingva Komitato difinas ĝian taskon. Oni ne povas diri, ke tiu artikolo en sia tiel ĝenerala formo, donas tre klaran bildon pri ĉio, kion la L.K. devus fari aŭ ne fari. Kiel, ekz., la L.K. devus zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de Esperanto, se ia verkistoj

kaj gazetistoj ne volus obei ĝin kaj aŭskulti ĝiajn admonojn? Kaj ankaŭ la tasko kontroli la evolucion de Esperanto estas sufiĉe elasta ideo, pri kies signifo oni povas diskuti.

Estas do necese, ke ni iomete legu inter la linioj kaj klopodu kompreni la devojn de la L.K. laŭ tio, kion la Esperantista publiko atendas de ĝi, kompreneble inter la limoj, kiujn la Statuto difinis. Kaj mi supozas, ke mi ne tute maltrafas la veron, se mi diras, ke la Esperantistoj deziras, ke la L.K. kaj ĝia Akademio estu gvida centro por la lingva evoluo, ke ĝi donu firmecon pri kio estas duba, ke ĝi klarigu kio estas malklara aŭ malpreciza, ke ĝi fiksu normojn, kies aplikadon ĝi povas rekomendi.

Se ni tiel komprenas la taskon de la L.K. malfermiĝas antaŭ niaj okuloj vasta perspektivo de farotaj laboroj kaj unua paŝo povus esti, fari programon pri la demandoj, kiuj atendas solvon.

Tiujn aferojn mi pripensis, kiam antaŭ unu jaro mi prenis sur min la taskon de prezidento de la L.K. Tamen anstataŭ perdi tro multe da tempo per la projektado de programoj kaj decidante prokrasti tiun taskon al pli oportuna momento, mi preferis jam tuj ataki iun problemon, kiu jam de longe okupis min kaj kiu en mallonga tempo povus doni pozitivan rezultaton. Kaj mi proponis, ke la Akademio komencu la ordigon de la vorttrezoro de Esperanto.

La bazon por tiu Esperanta vorttrezoro formas la Universala Vortaro de Zamenhof, parto de la Fundamento de Esperanto, kaj la 6 Aldonoj, kiujn la Akademio ĝis nun oficialigis por kompletigi tiun

unuan liston. En la Universala Vortaro Zamenhof difinis la signifon de ĉiuj elementoj de Esperanto (radikoj, afiksoj, finaĵoj) per ilia traduko en 5 lingvoj (franca, angla, germana, pola kaj rusa) kaj certe tiu metodo estis en la komenco la plej taŭga kaj plej praktika por instrui la lingvon al la publiko. Poste la Akademio komencis ankaŭ la publikigon de la tradukoj en diversaj aliaj lingvoj.

Tamen oni devas dubi, ĉu tiu metodo ne havas siajn malavantaĝojn, kiuj kuŝas en tio, ke kelkaj radikoj, kvankam uzataj internacie, havas en diversaj lingvoj malsamajn signifojn aŭ nuancojn de signifoj, kiuj ne precize kovras unu la alian. Kaj krom tio Esperanto jam evoluis al memstara kaj ĉie disvastigita lingvo, kiu povas helpi sin mem per propraj rimedoj.

Estas do dezirinde, ke ekzistu listo de ĉiuj ĝis nun oficialigitaj vortelementoj de Esperanto kun klarigo de ĉies signifo en Esperanto. Tia listo ne estos fincelo, kontraŭe ĝi estos nur komenco de kompleta vortaro de ĉiuj simplaj kaj kunmetitaj vortoj de Esperanto kun Esperantaj klarigoj kaj ekzemploj de aplikado. Sed la kunmeto de tia grandega vortaro, kiu ŝvebis jam kiel idealo antaŭ la okuloj de Zamenhof, postulas tre longan tempon de preparo kaj estus neeviteble, ke se oni povus komenci la publikigon en partoj, la verko restus nekompleta dum multaj jaroj.

Tial mi iniciatis kiel unuan paŝon la difinon nur de la oficialaj vortelementoj, ĉar mi opiniis, ke en ne tro longa tempo ni povos realigi tiun unuan ŝtupon de la Esperanta vortarego. La metodo havas

la avantaĝon, ke sur tiu unua fundamento oni povas facile plukonstrui la domon kaj ke ĉiam oni havos ion kompletan, kion oni povos doni kiel gvidilon en la manojn de la Esperantistoj.

Samtempe ŝajnis al mi interese, peti la kunhelpon por tiu leksikologia laboro de kiel eble plej multaj Esperantistoj. Tio estus ankaŭ provo vekti intereson por la laboro de la L.K. en kiel eble plej vastaj rondo.

Tial mi kunmetis liston de centoj da radikoj k.t.p. kun iliaj difinoj en Esperanto kaj tiun liston mi sendis, krom al la L.K.-anoj, ankaŭ al ĉiuj Esperantaj gazetoj kun peto pri publikigo. Samtempe mi petis al ĉiuj Esperantistoj, doni rimarkojn, konsilojn, korektojn pri la difinoj, por ke ni ricevu kiel eble plej vastan studmaterialon.

Bedaŭrinde nur relative malmultaj gazetoj povis publikigi la liston, verŝajne, ĉar ili ne disponas pri sufiĉe da loko por la regula enpresigo de tiaj listoj. Sed aliflanke evidentigis, ke la plano mem trovis multe da simpatio kaj el diversaj flankoj mi ricevis la petitan kunlaboron.

La ideo, starigi liston de vortdifinoj en Esperanto, tute ne estas nova. Jam en 1909 Boirac, la unua Prezidanto de la L.K., eldonis sian „Plenan Vortaron” kun klarigoj en Esperanto kaj tradukoj en franca lingvo. Tre konata estis dum longa tempo la tre bona vortaro de Kabe, kiu donis la difinojn de la oficialaj kaj de multaj ne oficialaj radikoj kaj de multaj kunmetitaj vortoj. En la lasta tempo la vortaro de Kabe trovis anstataŭanton en la „Plena Vortaro”, eldonata de S.A.T., kiu estas

bazita sur la samaj principoj, sed estas pli ampleksa kaj pli kompleta ol la vortaro de Kabe. Estas memkompreneble, ke tiuj diversaj vortaroj enhavas multe da materialo, kiu povis esti konsultata dum la kunmeto de la listoj de difinoj.

Inter la rimarkoj, kiujn mi ricevis el diversaj flankoj pri la unua listo de difinoj, ne mankis ankaŭ vortoj de kritiko, i.a. pri la tuta procedo. Ekzemple kelkaj proponis, simple preni la Plenan Vortaron de S.A.T. kiel bazon, kolekti rimarkojn pri ĝi de la L.K.-anoj kaj poste oficialigi ĝin kun la necesaj ŝanĝoj kaj korektoj. La metodo eble ŝajnas pli simpla ol tiu, kiun mi proponis sekvi, sed tamen mi opinias, ke ĝi nepre ne permesus tian sendependan kaj memstaran trastudon de la Esperanto vorttrezoro, kia estas nepre necesa por krei oficialan verkon. Ne estus prudente ligi sin tro multe al unu speciala verko, kiel ajn meritplena ĝi estu. Kun dankemo ni volas aŭskulti la konsilojn, kiujn donas al ni la verkoj de aliaj vortaristoj, sed ni devas eviti tro unuflankan orientiĝon tiurilate.

Aliaj esprimis sian bedaŭron, ke la proponita listo ne enhavas ekzemplojn. Mi tute konsentas pri la dezirindeco de ekzemploj kaj en la definitiva vortaro, kiun ni komencis konstrui, ili certe ne mankos. Sed ni faru unu paŝon samtempe. Kiam la listo de difinoj de la vortelemantoj estos preta, ni en sekvontaj eldonoj povos facile pliampleksigi ĝin. Ni aldonos la signifojn de la kunmetitaj vortoj, aldonos novajn nuancajn signifojn de la jam oficialigitaj radikoj, oficialigos novajn radikojn, aldonos ekzemplojn, k.t.p.

Pri unu speciala kritiko mi devas paroli pli detale, ĉar ĝi temas pri afero, kiu jam antaŭe kaŭzis viglajn diskutojn kaj kiu nun denove kondukis al seriozaj polemikoj.

Kiam oni komparas la signifon de diversaj radikoj en Esperanto, oni rimarkas, ke ili ne ĉiuj havas la saman karakteron. Neniu dubas, ke oni „hakas per hakilo” kaj ne „per hako”, sed ke oni „martelas per martelo” kaj ne „per martelilo”. Tio pravas, ke ne nur la vorto „haki”, sed jam la radiko „hak’ ” havas „verban karakteron” (mi ankoraŭ ne diras „estas verbo”) kaj ke kontraŭe ne nur la vorto „martelo”, sed jam la radiko „martel’ ” havas „substantivan karakteron” (mi ankoraŭ ne diras „estas substantivo”). Estas rimarkinde, ke evidente jam Zamenhof sentis tiun diferencigon, ĉar en sia „Universala Vortaro” li tradukis la „radikojn” (ne la radikojn kun finaĵoj) per substantivoj, adjektivoj k.t.p. Sed Zamenhof, kiu ofte agis intuicie, ne ĉiam klare realigis tion al si kaj tio estis kaŭzo, kial li en tre malmultaj okazoj donis la tradukojn per diversaj vortspecoj en diversaj lingvoj. Sed ekzemple en letero al Prof. Cart li klare skribis, ke al la radikoj „stamp’ ” kaj „stuk’ ” li intencis doni „signifon verban” (Originala Verkaro, paĝo 539).

Estas la nekontestebla merito de de Saussure, ke li kiel unua tre funde pripensis kaj esploris la teorion de la vortfarado en Esperanto. Lia vortteorio aperis jam en 1910 en franca lingvo kaj Zamenhof evidente tre ŝatis kaj aprobis ĝin, ĉar li skribis al de Saussure: „Laŭ mia opinio estus tre

utile, se vi eldonus ĝin ankaŭ en Esperanto, por ke ĉiu Esperantisto, precipe la verkantoj, atente ĝin tralegu kaj por ke ili penu observi tiujn principojn, kiujn vi bonege esploris kaj klarigis. Mi ne dubas, ke nia Akademio tre volonte donos al via propono sian oficialan aprobon... Via verko povas servi kiel bona modelo de efektive gravaj kaj utilaj Akademiaz laboroj."

De Saussure pli klare formulis la principon, ke la radikoj de Esperanto ne nur „havas gramatikan karakteron", sed estas mem „substantivoj, adjektivoj k.t.p." kaj li bazis tiun eldiron sur nerefuteblaj argumentoj, nome sur vortoj de Zamenhof mem, kiu nete deklaris, ke en Esperanto ĉiu radikoj, afikso kaj finaĵo estas „memstara vorto" (Fundamenta Krestomatio, 6-a eldono, paĝo 248).

Malgraŭ la klara argumentado de de Saussure, lia teorio tamen renkontis kontraŭstaron de kelkaj (Höveler, Panel k.a.), kiuj asertis, ke la radikoj estas neŭtralaj vortstumpoj, kiuj nur per la aldono de finaĵo ricevas gramatikan karakteron.

Oni povas diri, ke la afero en si mem ne estas tiel grava, ĉar evidente ambaŭ partioj en siaj polemikoj, kiuj sekvis, uzis praktike la saman lingvon kaj fakte la temo havas pli da intereso por la teoria esploro de la lingvo ol por la praktika instruado, kiun ĝi verdire ne influas.

Mi ĉiam trovis la teorion de de Saussure (kies posta forlaso de Esperanto ne devas influi nian prijuĝon pri liaj argumentoj) tiel simpla, logika kaj klara, ke mi opiniis, ke la vidpunkto de liaj kontraŭuloj estas jam de longe forgesita. Tial mi

metis en la publikigita listo de difinoj post ĉiu vortelemo inter krampoj unu aŭ kelkajn literojn (s = substantivo, a = adjektivo k.t.p.) por fiksi unufoje por ĉiam, precipe por la dubaj kazoj, al kiu kategorio ĉiu radikoj, afikso aŭ finaĵo apartenas.

Sed evidentiĝis, ke la teorioj de Höveler, Panel kaj la aliaj estas tute ne forgesitaj kaj mi tuj renkontis la kontraŭstaron de kelkaj el miaj kolegoj Akademianoj, unue de S-ro Nylén, kiu vigle protestis kontraŭ tio, kio evidente en liaj okuloj estas kvazaŭ atenco kontraŭ Esperanto kaj perfido de la Zamenhofa sistemo. Nu, mi tute ne konsentas pri tio, ĉar la riproĉo, ke la teorio de de Saussure komplikigus la lingvon kaj estus kontraŭa al la intenco de Zamenhof, estas tute malĝusta. Tion klare pruvas la ĉi supre citita letero de Zamenhof al de Saussure.

Kiel mi jam diris, la tuta problemoj preskaŭ ne tuŝas la praktikan formon de Esperanto kaj ĝi ne influos la simplan instruon de la lingvo. Por la ne instruita publiko Esperanto restos same simpla, kia ĝi ĉiam estis, sed la tasko, kiun la L.K. kaj ĝia Akademio entreprenas, ja ne estas laboro de simplaj uzantoj de la lingvo, sed de homoj, kiuj esploras la vortrezoron de Esperanto laŭ scienca vidpunkto. Ni ja ne estas ĉiuj profesiaj lingvistoj, sed ian lingvan kompetentecon oni ja prave postulas de ni kaj se ni serioze studas la argumentojn, kiuj pledas por la „gramatika karaktero" de la radikoj, mi estas certa, ke granda plimulto de la L.K. rekonos la nepran pravecon de la koncerna teorio kaj trovos, ke ĝi tute ne komplikigas la lingvon,

sed kontraŭe ordigas kaj firmigas ĝin.

Mi povus citi ankoraŭ tre multajn argumentojn, favorajn al la vortteorio de de Saussure, sed tio estus tute superflua, ĉar de Saussure mem verkis tre detale pri la temo kaj klare refutis la argumentojn de siaj kontraŭuloj kaj mi supozas, ke liaj verkoj estas ankoraŭ atingeblaj por miaj kolegoj L.K.-anoj.

Kiam mi respondis al la argumentoj de S-ro Nylén mi samtempe petis la opinion de la aliaj L.K.-anoj pri la temo. Multaj el ili bonvolis kontentigi tiun peton, pro kio mi deziras danki ilin tie ĉi, ne povante fari tion al ĉiuj persone. Mi spertis, ke mia vidpunkto trovis fortan apogon kaj kelkaj eĉ sendis al mi artikolojn por subteni mian opinion kaj disponigis ilin al mi por dissendo inter la L.K.-anoj. Por esti justa, mi volonte estas preta dissendi ankaŭ esprimojn de la kontraŭa opinio kaj tial ekzemple mi ŝatas rekomendi al la atento de la L.K.-anoj la raporton de S-ro Bailey, Direktoro de la Sekcio por la Komuna Vortaro, kiu evidente havas opinion tute kontraŭan al mia. Mi poste dissendos al la L.K.-anoj ankoraŭ la opinion de unu aŭ du aliaj kolegoj.

Pri la argumentoj de la kontraŭa partio mi volas nur rimarkigi, ke kelkfoje oni klopodas refuti la teorion de de Saussure per la citado de vortoj aŭ frazoj de Zamenhof. Sed tio ŝajnas al mi ne ĝusta. Kiel mi jam diris Zamenhof ne komencis per la starigo de vortteorio, sed li kreis kaj uzis la lingvon intuicie kaj tial li certe en la komenco kelkfoje deviis de reguloj, kiuj poste ŝajnis al li

tute logikaj. Oni nepre ne povas ĉerpi el tio argumentojn kontraŭ la vere eminenta teorio de de Saussure, kiu, kiel ajn ni malŝatas lian postan forlason de Esperanto, certe havas la grandan meriton, ke li estis la unua, kiu donis firman bazon al la logika vortkonstruo en Esperanto.

La Akademio kaj la L.K. iam devos preni decidon pri tiu ĉi problemo, ĉar la publiko ja deziras scii, kiujn regulojn ĝi devos sekvi. Sed ni ne povos fari decidojn, antaŭ ol la afero estos rigardita el ĉiuj flankoj. Estas tial, ke la L.K.-anoj jam ricevis diversajn argumentojn pri la temo.

Mi povas bedaŭri nur unu punkton, nome, ke la ampleksaj korespondado kaj laboro, kiujn kaŭzis al mi tiu ĉi diskutado, malebligis al mi daŭrigi la publikigon de la listoj de difinoj. Mi devas peti la indulgon de miaj kolegoj pro tio kaj mi povas doni la certigon, ke mi esperas baldaŭ daŭrigi ĝin. Ni ja decidis aparte pri la problemo de la gramatika karaktero de la radikoj, sed dume ni povas trankvile daŭrigi la studadon de la signifoj. Ke mi dumtempe en la novaj listoj ree aldonos la indikojn (s), (a) k.t.p., do staras tute aparte de la prenota decido.

Mi havas la plenan fidon, ke ni studos la problemon en objektiva maniero kaj per bonvolaj diskutoj — ne disputoj — venos al la ĝusta solvo.

J. R. G. ISBRÜCKER,

Prezidanto.

RAPORTO DE LA DIREKTORO DE LA SEKCIO „KOMUNA VORTARO“

Ĉe la kunveno de la Lingva Komitato en la Varsovia Kongreso (12 Aŭgusto 1937) oni aprobis proponon de nia prezidanto, ke la Lingva Komitato starigu liston de difinoj de ĉiuj oficialaj radikoj kaj vortelementoj de Esperanto. La laboro super ĉi tiu granda kaj grava tasko jam komenciĝis, sed tuj en la komenco montriĝis, ke ne ekzistas konsento pri la demando, ĉu la radikoj de la Universala Vortaro havas karakteron gramatikan, t.e. ĉu ili estas per si mem substantivoj, verboj k.c. La prezidanto proponis, ke mi esprimu en ĉi tiu raporto mian opinion pri la nomita demando.

En la daŭro de longa serio da jaroj mi kunmetis grandan konkordancon de vortoj kaj frazoj el ĉiuj haveblaj verkoj de Zamenhof, kaj per helpo de ĉi tiu konkordanco mi funde esploris la demandon laŭ vidpunkto *pure objektiva*. Jen estas la rezultato de la esploro: mi plene konvinkiĝis, ke la radikoj estas neŭtralaj elementoj, kiuj fariĝas „partoj de parolo“ per aldono de la respondaj gramatikaj finiĝoj. (Kompreneble, la nacilingvaj difinoj estas „partoj de parolo“, ĉar en la naciaj lingvoj ne ekzistas difinoj neŭtralaj.) Se la kontraŭa opinio estus ĝusta, en tiu okazo la gramatikaj finiĝoj estus „superflua balasto“, kaj ni devus aŭ forĵeti ilin, aŭ uzi ilin nur por specialaj bezonoj, ekzemple rimo aŭ ritmo. Ĉe la Zamenhofsia sistemo, kontraŭe, la kunfinaĝa formo estas normala, kaj nur por spe-

cialaj bezonoj oni forlasas la finan vokalon de la substantivo kaj de la artikolo.

Se la radikoj *frost*, *genu*, *pac*, *plezur* estus per si mem substantivoj, en tiu okazo la vortoj *frostigi*, *genuigi*, *pacigi*, *plezurigi* signifus respektive *igi frosto*, *igi genuo*, *igi paco*, *igi plezuro*; tamen en la verkoj de Zamenhof ili tiajn signifojn ne havas. Cetere, Zamenhof diris klare: „ĉiu substantivo en la nominativo finiĝas per o“. (Krestomatio, p. 248.)

La kontraŭa opinio kondukas al konkludoj, fremdaj al la Zamenhofsia sistemo. Ekzemple, unu eminenta subtenanto de tiu opinio diras: „skribo = skrib(ag)o.“ En la nomita konkordanco mi kolektis el la verkoj de Zamenhof 25 ekzemplojn de la vorto *skribo*, kaj ili ĉiuj senescepte signifas ne *agon*, sed *ajon*. Se la radiko *konstru* per si mem estus verbo, en tiu okazo la vorto *konstruo* ĉiam havus la senco *ago konstrui*; tamen en la Zamenhofsia lingvo ĝia senco estas jen *konstruajo*, jen *konstruado*, jen *strukturo* (konstrusistemo), konforme al la kunteksto, en kiu ĝi staras. Tiam saman konstaton oni povas fari koncerne multajn aliajn vortojn.

Tra la tuta Zamenhofsia verkaro regas *principo de elasteco*, kiu multe faciligas la uzadon de la lingvo por la homoj ne multe instruitaj, sed ne plaĉas al multaj instruitaj lingvistoj. En mia konkordanco, sekve de la grupigo de la vortoj kaj frazoj, ĉi tiu principo montriĝas eĉ pli okulfrape, ol en la literaturo.

De la plej frua tempo de Esperanto ĝis nun diversaj lingvistoj penadis pliprecizigi la lingvon,

kaj ĝuste kontraŭ ĉi tiu penado Zamenhof aperigis siajn ofte ripetitajn konsilojn pri *logiko absoluta, troa precizeco, senbezona katenado, proponoj, kiuj havas ĵizionomion instruitan* k.c.

„Nia lingvo ĉiam devas esti simpla kaj facila,” diris Zamenhof. („Universo”, vol. II. p. 294.) Ni zorge gardu ĝin kontraŭ la enkonduko de rigidigaj reguloj de ekstere.

WILLIAM BAILEY.

Direktoro de la Sekcio K.V.

RAPORTO DE LA DIREKTORO DE LA SEKCIO „TEKNIKAJ VORTAROJ”

1. — Estas neutile pridiserti la malfacilaĵojn, kiujn prezentas la teknikaj terminaroj, kaj pli-generale la teknika terminologio. Ĉiutage, en ĉiuj naciaj lingvoj, novaj terminoj, ofte misfaritaj, naskiĝas. La internaciaj sciencaj rondoj atentis tiun gravan problemon. En 1934, la Kongreso de *International Federation of National Standardizing Associations* (ISA) decidis la starigon de iu „Code Terminologique International” (CTI). — Esperante: Internacia Terminara Kodo, — por sciencoj kaj diversaj teknikoj. Oni memoru la ISA-Raporton verkitan de s-ro E. Drezen, LK-ano. „Pri problemo de internaciigo de science-teknika terminaro” (*Ekrelo*, Amsterdam-Moskvo, 1935). Petite de ISA, s-ro Drezen verkis sciencoplenan alian raporton, en kiu li rezone pruvas la taŭgecon de Esperanto kiel starig-fundamento de tia kodo.

La afero daŭras. ISA estigis komitaton nomatan „ISA-37 Terminologio”. Verdire, la problemo estas malsimpla; ĝi malrapide, malfacile solviĝas. Oni ne plu konsentas pri la gramatiko de CTI; du „ismoj” kontraŭstaras: memstar’ismo (Esperanto-sistemo) kaj natural’ismo (Occidental-sistemo)... La „proceso” estas iamaniere proponita de ISA-37 antaŭ *International Auxiliary Language Association* (IALA). Lingvistoj kaj interlingvistoj energie diskutas. Mi volas kredi, ke Esperantaj rondoj interesiĝos pri tio. Estas grave.

2. — En Francujo, iniciate de altestimata Prof. Mesny, kelkaj teknikuloj grupiĝis sub la titolo *Comité d’Etudes pour l’Élaboration d’un Code Terminologique International* (CECTI), — esperante: *Studkomitato por Starigo de Internacia Terminara Kodo* — (Ĝenerala Sekretario: A. L. Helleboid). Tiu komitato estas tute memstara kaj sendependa. Ĝiaj celoj estas:

1^o — arigo de dokumentoj kaj serĉado kaj kunigo de materialoj. Laŭ la 1937-Raporto de la Prezidanto de la Lingva Komitato, CECTI preparas „tiamaniere altvaloran dokumentaron por venontaj fakaj komisionoj de la Sekcio *Teknikaj Vortaroj* de la Akademio”.

2^o — helpo laŭokaze al la normig-asocioj.

3. — Siaflanke la 3a Sekcio „Sciencoj puraj kaj aplikataj” de 1937-Pentekosta Poresperanta Konferenco en Paris estis tre agema. Vidu pri tio la Raportojn kaj Konkludojn de la Konferenco (p. 69/101). Ni memorigu ĉi tie la deziresprimojn de la riparolata Sekcio:

„La Internacia Konferenco pri Esperanto en „Moderna Vivo rekomendas:

„1^o — Ke, por uniformigi la teknikan terminaron, la presotaj artikoloj estu komunikataj al „*Studkomitato por Starigo de Internacia Terminara Kodo* por kontrolo. Tiu studkomitato celas helpi „oficialajn naciajn asociojn pri normigo, kaj metas „sian dokumentaron je la dispono de ĉiuj.

„2^o — Ke, ĉar estas necese, ke la teknikaj „vortaroj estu facile akireblaj kaj utiligeblaj;

„a) Ĉefeĉ'aj sciencaj teknikaj ŝlosiloj estu el- „donataj;

„b) la Bulteno de ISAE presu la novajn ter- „minojn sub apartigeblaj folioj.

„3^o — Ke, por malaltigi la elspezojn kaj pli- „kreskigi la abonantaron, la multnombraj diversaj „teknikaj gazetoj estu anstataŭigataj per unu „nura revuo.

„4^o — Ke, por faciligi la internacian normig- „adon kaj helpi ĝian kreskadon sur ĉiuj terenoj, „tuja agado estu entreprenata ĉe la naciaj norm- „igaj asocioj, por ke Esperanto estu alprenata kiel „helplingvo en la terminaraj kodoj.

„5^o — Ke Esperanto estu enkondukata en la „teknikajn kaj sciencajn lernejojn, samnivele kiel „fremdaj lingvoj, precipe en la maristajn kaj „aeronaŭtikajn lernejojn.

„6^o — Ke oni enketu pri sciencaj aŭ industriaj „revuoj, kiuj konsentus eventuale aperigi espe- „rantajn resumojn de iliaj artikoloj, kaj ke oni „klopodu per ĉiuj rimedoj (personaj, administra- „ciaj, ktp.) por atingi tiun rezultaton;

„Ke ĉiu aŭtoro de libro aldonu al ĝi enkon- „dukan resumon en Esperanto.

„7^o — Ke oni ĉiam redaktu esperantan resum- „on de publikigaĵoj de famaj sciencistoj kaj ke oni „sendu ĝin al la aŭtoroj kun persona letero.”

4. — Aliparte la Esperanta Akademio faris al mi grandan honoron elektante min Direktoro de la Sekcio *Teknikaj Vortaroj*.

Certe la celoj de CECTI kaj tiuj de la Sekcio T.V. iagrade diferencas; sed ambaŭ kampoj ofte samiĝas, almenaŭ interrilatiĝas.


Ŝajnas al mi necese starigi labormetodon racion; iun mi proponos en la proksima numero de ISAE-Bulteno.

Sed mi de nun alvokas kunlaboradon de ĉiuj bonvoluloj. Tutkompreneble mi danke ricevos sugestojn.

A. L. HELLEBOID,
Direktoro de la Sekcio T. V.

RAPORTO DE LA DIREKTORO DE LA SEKCIO „GRAMATIKO”

Dum la lasta jaro en la esperantistaj rondoj montriĝis vigla intereso pri diversaj punktoj en nia gramatiko, pri kiuj ankoraŭ ne regas unuanimaj opinioj ĉe la kompetentaj esperantistoj. Certe ĉiuj kolegoj kun atento sekvis la publikajojn de nia estimata prezidanto kaj la diskuton pri la gramatika karaktero de la vort-radikoj. La opiniojn de diversaj kolegoj pri tiu temo ricevis nia tuta kolegaro per aparte dissenditaj cirkuleroj.



Kiel provizora gvidanto de la Sekcio de Gramatiko mi ricevis dum la lasta jarperiodo unu skribajon, de nia kolego s-ro Minor. Pro liaj atentindaj vidpunktoj kaj klarigoj, kaj ĉar lia skribaĵo estas respondo je raporto aperinta en nia antaŭa jarlibro, mi volonte prezentas ĝin ĉi tie al nia tuta kolegaro.

ANDREO CSEH.

Leginte la raporton de la Sekcio „Kontrolo” en la antaŭa Jarlibro de la Lingva Komitato, mi devas kontraŭparoli preskaŭ ĉiujn rimarkigojn de Prof. Boucon.

-i- por *landnomoj*. Tiu sufikso, kiun cetere mi ne uzas, certe ne estas kontraŭfundamenta. Oni rajtas uzi — se oni tion kredas necesa — novajn vortojn kaj afiksojn — kaj por ideoj, por kiuj ankoraŭ ne ekzistas radikoj aŭ afiksoj, kaj apud malnovaj. Do oni rajtas ankaŭ uzi novan sufikson apud -ujo por *landnomoj*. Fakte ja ĉiuj fundamentaj sufiksoj konsistas el pli ol unu litero; kaj estas nekutimaĵo, uzi kiel neologismon radikon aŭ literon, kiu en la Fundamento jam estas uzata por alia celo aŭ kun alia signifo. Tamen, kvankam la litero *i* estas la laŭfundamenta finaĵo de la infinitivoj, kaj kvankam ne ekzistas kroma sufikso konsistanta el nur unu litero, ne estas kontraŭe al la Fundamento kaj al nia lingvo, uzi *-i-* kiel sufikson por *landnomoj*.

-end- *anst.* *-ota*. Tre stranga estas la rimarkigo pri *-end-* kaj *-ot-*! La „nova sufikso” *-end-* ne havas adeptojn, kiuj nepre volas starigi ian diferencon inter *-end-* kaj *-ot-*... Sed ĉiu, kiu

favoras *-end-* (kaj mi ankaŭ estas inter ili!) — uzas *-end-* nur pro tio, ke la arkaja apliko de *-ot-* estas arbitra kaj danĝera. (En tiu alineo Prof. Boucon diras „La samo...”, kio certe estas pli mal-korekta, mallogika kaj ne-Zamenhofa ol la plimulto de la formoj, kiujn li malaprobas. Oni devas diri — same kiel Zamenhof — „Tio sama...”)

aliu, onies, aliam etc. Mi samopinias kiel Prof. Boucon kaj publikigis noton pri tio en „Sennaciulo”. Tamen, la neniam malaprobata vorto „neiigi” ŝajnas pravigi la uzantojn de tiuj formoj.

eksidi, ekstari, ekkusi. La malaprobo de tiuj vortoj, ĉar ili esprimas staton, kaj stato ne estas ago, estas bagatelema. Se oni volus tiel limigi la signifojn, oni rigidigus la lingvon; kaj ankaŭ la vortoj estonteco, edzeco estus malaprobindaj, ĉar ili signifas statojn kaj ne ecojn. Kaj ecoj ne estas statoj, aŭ ne estus statoj laŭ Prof. Boucon.

-ita/-ata. Ne estas kompreneble, kiun influon la verbeco aŭ adjektiveco de participoj havas al la signifo. Esplorinte la demandon pri *-ata/-ita* mi venis al la jenaj konkludoj:

La diferenco inter la du malaj opinioj devenas de tio, ke ni — en E — havas 3 aktivajn kaj 3 pasivajn participojn, dum ke la naciaj lingvoj havas nur po unu. En la naciaj lingvoj la pasiva participo estas koresponda je *-ita*, kaj ne je *-ata*. Tial pro la influo de la naciaj lingvoj, multaj eĉ tre bonaj E-istoj (kaj kelkfoje eĉ Zamenhof mem!) uzas (resp. uzis) *-ita*, kie ni devus (ĉar ni povas) uzi *-ata*. Fakte diskutado nur okazas pri certaj okazoj, en kiuj unuj volas uzi kaj uzas *-ita* (pro la influo

de nacia lingvo), kaj aliaj defendas -ata. Kaj laŭ mia opinio la „atanoj” estas pravaj el Esp.-gramatika vidpunkto.

Tri punktoj estas nepre atentendaj por tute kompreni la aferon:

1) Ne ekzistas helpa verbo en Esperanto; ankaŭ „esti” ne estas tia. La esprimo „helpa verbo” estas erariga. La plej karakteriza eco de helpa verbo (en la naciaj lingvoj) ne estas, ke ĝi (nur) helpas por fari certajn „formojn”, sed la ĉefa eco de helpa verbo estas, ke ĝi, kiel tia, tuta perdas sian originan signifon.

Ekzemple: „haben” = „posedi”. Tamen: „ich habe geschrieben” = „mi skribis”. — „Shall” = „devi”. Tamen: „I shall see you to-morrow” = „mi vidos vin morgaŭ”.

En E „esti” ne perdas la signifon „troviĝi”.

2) En la naciaj lingvoj la kombinitaj formoj (helpverbo kun participo) estas „unu tutaĵo”. (Tute logike kaj necese, ĉar en tiuj okazoj la helpverbo ja ne havas signifon.) En E temas pri 2 verboj, de kiuj ĉiu havas sian apartan signifon aŭ efikon.

3) La estanteco ne havas daŭron, dum ke la estinteco kaj estonteco estas senfinaj. Sekve: estintan kaj estontan okazaĵon oni povas rigardi de sennombraj „punktoj”: de multaj antaŭaj, multaj postaj punktoj kaj de samtempa punkto; kaj „esti” transportas nin al tiu punkto en la estinteco aŭ estonteco, de kie ni rigardu la agon esprimatan de la participo.

Jen kelkaj ekzemploj:

Patro diras al sia filo: „Vi estis malbona, do mi punos vin”.

La punado okazos en la estonteco. Uzante pasivan formon, la patro dirus: „... do vi estos punata (aŭ, kiel Leono Zamenhof diris: vi estos punita)”. Se la patro diras: „vi estos punata”, „estos” transportas la ideojn de la filo al la tempo de la punado; se li diras „vi estos punita”, „estas” transportas la ideojn de la filo al la tempo post la punado. Certe la patro volas pensigi la filon pri la momento mem de la puno (ĉar poste la filo jam forgesis la punon!), do „vi estos punata” estas pli logika, kaj la esprimmaniero de Leono Zamenhof (kiu ja diskutis pri la supra ekzemplo kun Teo Jung) estas „nacilingva”.

Nia Majstro Zamenhof ankaŭ uzis multajn -ita-formojn, kie -ata estus preferinda:

„Antaŭe ni iradis en la lernejon kaj iom lernis, kaj poste ni estis konfirmitaj” (Fab. II, pĝ. 78).

„ni estis konfirmitaj” esprimas la longan tempon post la konfirmado”.

„Jes, ili (la ŝuoj) brilas... ili montriĝis laŭmezuraj kaj estis aĉetitaj” (Fab. II, pĝ. 99).

„estis aĉetitaj” montras la tempon post la aĉeto.

Mi ne hezitas opinii, ke ankaŭ la Zamenhofs uzis de -ita en ĉi tiuj ekzemploj kaj en multaj aliaj (speciale multaj -os -itaj en la Biblio) rezultas el nacilingva influo; oni povas ankaŭ supozi, ke Zamenhof intence ne volis atentigi pri la momentoj de konfirmado resp. aĉetado, ĉar tiuj momentoj

estas malpli gravaj ol la postaj statoj de konfirmiteco resp. posedado.

Do kvankam, kiel Prof. Boucon diras, „oni rajtas ofte uzi -ata aŭ -ita sen granda diferenco”, tamen en ĉiuj ĉi okazoj -ata estas preferinda laŭ Esp-gramatika vidpunkto, kaj ni uzu la preferindan nuancon, kiun donas al ni Esperanto, kontraŭe al la naciaj lingvoj kiuj malhavas tiun riĉecon.

CH. MINOR,
Akademiano.

RAPORTO DE LA DIREKTORO DE LA SEKCIO „KONTRŬLO”

Koncerne la *periodaĵojn* estas konstateble, ke pli kaj pli maloftaj estas la gramatikaj eraroj — nur pri *ita-ata* kelkaj dubaj uzoj montriĝas —, sed la tekstoj estas ĝenerale rimarkinde redaktitaj, kaj la lingvo estas uzata tiel simile, ke per la formoj oni ne povas koni la naciecon de la aŭtoro.

Ĉar escepto pravigas regulon, ni citu la fantaziaĵojn de unu aŭstralia revuo — kaj la nepravigblan metodon de la Sennacieca Revuo, skribi la proprajn nomojn laŭ la nacia prononco: *Klemenco* (= Clemenceau), *Idn* (= Eden) k.t.p. Feliĉe ili ne havas imitantojn.

Ankaŭ mi rimarkis tendencon uzi formojn *eblas*, *certas*, k.t.p. en kelkaj literaturaj revuoj.

La *lingvaj konsiloj*, redaktitaj de lertaj profesoroj estas ĝenerale ĝustaj; ŝajnas, ke ili fariĝas malpli multaj; la diskutoj pri *gramatikaj demandoj*

preskaŭ tute ĉesis. Nur en la japanaj revuoj oni trovas studojn pri kelkaj vortoj aŭ esprimoj kaj tio montras, ke tiuj formoj, kiujn la eŭropanoj opinias tute naturaj, ne estas facile kompreneblaj de la aliaj. Bedaŭrinde malgraŭ miaj ripetitaj petoj, tiuj studoj estas japane redaktitaj; se estas ne eble redakti ilin Esperante, oni almenaŭ aldonu Esperantan resumon.

La Sekcio estas petita de la Franca Societo kontroli la tekstojn de la *teatraĵoj dissendotaj* per la francaj stacioj de T.S.F. Estas dezirinde, ke en la aliaj landoj, kie okazas tiaj dissendoj, sama kontrolo estu farata.

De unu jaro la Sekcio ekzamenis dekon da *libroj* dank' al la aktiveco kaj sindonemeco de *Profesoro Boucon*, kiu, preskaŭ sola, plenumis tiun taskon.

Jen liaj ĉefaj konkludoj:

..... La rimarkoj de mi faritaj ĝenerale plaĉis al la recenzitaj verkintoj; iuj el ili skribis eĉ rekte al mi, por esprimi sian dankon. Mi tiel konstatis kun plezuro, ke la verkistoj pli kaj pli imitas la stilon de nia majstro, la supera gvidanto por ni ĉiuj.

Jen kelkaj rimarkoj:

1) *la prepozicio je*. Laŭ la konsilo de Zamenhof mem, oni devas uzi ĉi tiun prepozicion kiel eble plej malofte; ĝin oni konservas precipe por esprimi la lokon kaj la tempon anstataŭ la akuzativo: „Restu tie for, je 20 metroj; li alvenis ekzakte je la deka (horo) kaj 20 minutoj”.

2) *ata-ita*. Pri la ĝusta uzado de tiuj du participaj formoj Zamenhof ne starigis specialan teorion

regulon; sed en liaj verkoj troviĝas sufiĉe da ekzemploj, por ke la verkistoj, lin imitante, estu same bone komprenataj.

3) *ĉe kun la akuzativo*. Zamenhof neniam esprimis la almovon per *ĉe kun la akuzativo*; li tiam uzas la prepozicion *al*: „mi venas de la avo kaj mi iras nun al la onklo (Krestomatio § 5)“.

4) *domaĝi, damaĝi*. Ĉe Zamenhof la verbo *domaĝi* signifas *ami* aŭ *ŝati* kaj ĝi neniel signifas *difekti* aŭ *malutili*; por ĉi tiu lasta senco kelkaj verkistoj uzas la neoficialan *damaĝi*.

5) *Loko de la substantivo rilate al sia artikolo*. Laŭ la principo, ke *ĉiu vorto devas stari apud la frazero, al kiu ĝi rilatas*, la substantivo ankaŭ devas stari kiel eble plej proksime de sia artikolo; tial anstataŭ „*la de vi ricevita mono*“, ni diru prefere: „*la mono de vi ricevita*“, aŭ „*la mono, ricevita de vi*“.

6) *tiom-kiom*. Multaj verkistoj ne sufiĉe atentis la rimarkon de S-ro Isbrücker kaj uzas *tiom, kiom* anstataŭ *tiel, kiel*; ili diras ekzemple: „*ŝi estas tiom riĉa, kiom bela*“ anstataŭ *tiel riĉa, kiel bela*“.

7) *unu, ia, iu*. Unu estas esence numeralo: „*donu al mi unu libron*“ (ne *du*); ia estas adjektivo: „*donu al mi ian libron*“ (ian ajn libron); iu estas pronomo: „*donu al mi iun libron*“ (t.e. *iun el* tiuj, *el* viaj libroj).

8) *virinaj nomoj*. Iu eminenta samideano proponis, ke oni donu al ĉiuj virinaj nomoj la finajon *a* kaj efektive ni jam vidis en *Literatura Mondo* la vortojn *Izabela, Jozefa, Paŭla, Seraĥina, Suzana* k.a. La propono estas vere interesa; sed ni ne

katenu nin per ia *unu* regulo; ĉu oni diru ankaŭ: *Alfonza, Viktora, Noemia, Cezara, Estera*?

9) *S.A.T.-ajoj*. Per ĉi tio mi aludas pri la sufikso *io* ĉe la landnomoj, pri la grafismo de la propraj nomoj: *Kajo, Bon, Erjo* (Caillaux, Beaune, Herriot), pri la mallongigoj: *k* (kaj), *Espistoj* (Esperantistoj), *kdo, kdino* (kamarado, kamaradino) kaj similaj kaj fine pri la kontraŭfundamentaj formoj *aliam, aliel, alies, onies* k.t.p. Vane oni diras, ke ni ne devas atenti tiajn bagatelojn; ni devas tiom pli energie protesti, ĉar ĉe Zamenhof la formo *alie* signifas *alimaniere*, dum ke ĉe la S.A.T.-anoj ĝi signifas *aliloke* kaj ĉar la *Plena Gramatiko* ilin ne kondamnas formale (vidu la §§ 70 kaj 192).

10) *Neologismoj*. La multenombraj, tiel nomataj, *poeziaj* neologismoj de la Budapesta skolo ŝajnas al mi malpli danĝeraj, ĉar iliaj aŭtoroj apartenas al ia elito de beletristoj kaj preskaŭ nur en *Literatura Mondo* ni renkontas tiajn vortojn, kiaj *trista, pigra, povra, kurta, humida, noci, aperti, kutelo, devori, sterila, violenta* k.t.p.

Mi ĵus legis la duan eldonon de Ĉu li?, la originala romano de D-ro Vallienne, reviziita de S-ro Kalocsay. Nu, ĉi tiu verko perfekte montras la nunan stadion de nia lingvo kaj sintezas ties evoluon. Mi ne parolas pri la enhavo de la libro, sed nur pri la stilo, kiu estas nepre korekta kaj klara kaj povas servi kiel modelo“.

Malgraŭ la ripetitaj rekomendoj de la Prezidanto de la Lingva Komitato, la Sekcio ne ricevas ĉiujn periodaĵojn kaj nur la ĉefaj eldonistoj sendas al ĝi siajn publikigaĵojn. Ni denove insistas, por

ke tiu manko ĉesu, ĉar nur se ĝi estas senmanka,
kontrolo povas esti efika.

Junio 1938.

ROLLET DE L'ISLE.

Direktoro de la Sekcio Kontrolo.

LINGVA-KOMITATANOJ

(La nomoj de la Akademianoj estas en dikaj literoj.)

- ALBERICH-JOFRÉ (S.), Rambla del Prat, n^o 1, 3-er, Barcelona, (Katalunujo), Hispanujo.
ANDREJEV (A. P.), ?
ARCHDEACON (Ernest), surŝipe de „Jahto Esperanto”,
Quai Carnot, Saint-Cloud (S.-et-O.), Francujo.
BACKHEUSER (Prof. Dr. E.), Caixa postal 2494, Rio de Janeiro, Brazilo.
BAGHY (J.), Rottenbiller utca 66-1-20, Budapest VII, Hungarujo.
BAILEY (Th. Grahame), 236, Nether Street, London N 3, Anglujo.
BAILEY (W.), Maradomo, Glan-y-Mor Road, Penrhyn Bay, Caernarvonshire, (Kimrujo), Gr.-Britujo.
BAIRD (F-ino Jane), 95, Bellevue Road, Edinburgh, Skotlando.
BASTIEN (L.), Rue de Vaugirard, 116, Paris-6e, Francujo.
BELMONT (L.), Marszalkowska, 97 A, Varsovio, Polujo.
BIALCHINI (P. T.), Cimpello de Pordenone, Friuli, Italujo.
BLICHER (M.), Hjortøgade 1², Kopenhago, Danujo.
BLOK (H.), Amstellaan 55, Amsterdam (Z.), Nederlando.
BOBIN (M.), Rue de la Tour, 80, Paris-16e, Francujo.
BODÓ (K.), Szaboleska Mihály utca 18. fsz. 2, Budapest I, Hungarujo.
BOFILL M. GRANADA (N.), 31 Diciembre n^o 46, 3^o izq., Palma de Mallorca (Balearoj), Hispanujo.
BOUCON (H.), Boulevard du Lycée, 10, Annecy (Haute-Savoie), Francujo.
BREMÓN (D-ro J.), Balmes, 102, Barcelona, (Katalunujo), Hispanujo.

BUGGE-PAŪLSEN (R. E.), (pseŭd. Ro Bo Po), Schives gt 4¹, Oslo, Norvegujo.
 BULTHUIS (H. J.), Kamillestraat 37, Hago, Nederlando.
 BUTLER (Montagu C.), 36, Penrhyn oad, Kingston-on-Thames, (Surrey) Anglujo.
 CHAVET (G.), Rue Gauthier-de-Châtillon, 6, Lille, Francujo.
 COGEN (L.), 52, Drève, Ninove, Belgujo.
 COŪTEAUX (Jean), Hôpital Cochin, 27, Faubourg Saint-Jacques, Paris-14e, Francujo.
CSEH (Andreo), Riouwstraat 172, Hago, Nederlando.
 CZUBRYNSKI (D-ro Antoni), Wesola 32, Wlochy pod Warszawa, Polujo.
 DALMAŪ (Delfi), 245, str. Valencía, Barcelona, (Katalunujo), Hispanujo.
 DELIGNY (Ernest), 4, rue Allent, Saint-Omer (Pas-de-C.), Francujo.
 DEMIDJUK (G.), Degtjarni 5, kv. 6, Moskvo-6, U. S. S. R.
 DIEZ (F.), Zurbaran, 9, Begeña, Bilbao, Hispanujo.
 DOMINGUES (Carlos), Praça da República 54, 1^o, Rio de Janeiro, Brazilo.
 DREHER (L.), Starowislna, 37, Kraków, Polujo.
 DRESEN (S-ino Helmi), postkast 6, Tallinn, Estonujo.
 DREZEN (E.), Skatertni 3, kv. 5, Moskvo-69, U. S. S. R.
 ELLERSIEK (F.), Wilmsstr. 5, Berlin S. W. 61, Germanujo.
 ESSELIN (A.), 161, rue de Charonne, Paris-11e, Francujo.
 FISCHER (H.) Str. Dr. Istrate, 10, Bucuresti, Rumanujo.
 GHEZZO (D-ro A.), Via Montecucco, 6, Trieste, Italujo.
GRAU CASAS (Jaume), Aiguësbones, (Katalunujo), Hispanujo.
 GRENKAMP-KORNFELD (S.), 117, Boulevard Jourdan, Paris-14e, Francujo.
 HARVEY (W.), Craighill Gardens 1, Edinburgh-10, Skotlando.
 HEILKER (P.), Hoofddorp, Nederlando.
 HODAKOWSKI (T.), Legionów 17, Nowy Sacz 2, Polujo.
 HOHLOV (N.), Marjino, 22, Moskvo-75, U. S. S. R.
 HROMADA (R.), Socharská, 333, Praha VII, Ĉeĥo-

slovakujo.
INGLADA (V.), Profesor de la Escuela superior de Guerra, Chinchilla, 2, Madrid, Hispanujo.
ISBRŪCKER (J. R. G.), Oostduinlaan 32, Hago, Nederlando.
 JANSSON (Sam-S.Jn), Skogen 23, Lidingö, 1, Svedujo.
 JUNG (Teo), Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.
 JIRKOV (L.), Trubnikovski per. 26, lĝ. 8, Moskvo-69, U. S. S. R.
 KALOCŜAY (D-ro K.), Mária u. 34, III, 4, Budapest VIII, Hungarujo.
 KAMARYT (D-ro Stan.), Zochova, 3, Bratislava, Ĉeĥo-slovakujo.
 KAROLCZYK (S., Eska), Marszalkowska 60 31, Varsovio, Polujo.
 KAWASAKI (Naokazu), 1617 Sumiyosityô, Sumiyosiku, Osaka, Japanujo.
 KENN (Won), P. O. Box 88, Canton, Ĉinujo.
 KENNGOTT (Prof. A.), University of Texas, Austin (Texas), Usono.
 KOSTECKI (J.), Miedzylesie k/Otwocka, Dom J. Fluksa, Polujo.
 KRESTANOV (I.), ul-6 Septemvri, 2, Sofia, Bulgarujo.
 KŪHNL (E.), Secretario de la Legación Checoslovaca, Santiago de Chile (Ĉilo).
 LA COLLA (S.), Via Dandolo, 24, Roma, Italujo.
 LAIGNIER (M.), 22, rue Courmeaux, Reims (Marne), Francujo.
 LAJARTE (R. Dufaure de), 4, villa d'Orléans, Fontenay-sous-Bois (Seine), Francujo.
 LEJZEROWICZ (J.), Kilinskiego, 30, Łódź, Polujo.
LIPPMANN (D-ro W.), Leibnizstr. 13, II, Leipzig, Germanujo.
 LUNDRĜEN (J.), Hedemora, Svedujo.
 MIĤALSKI (Eĝ.), ?
MINOR (Charles), 62, Cranwich Road, Stamford Hill, London N. 16, Anglujo.
 MUCNIK (I.), Kfar Jehĉsuo, apud Ĥaifa, Palestino.
 NEERGAARD (Paul), Gothersgade 158, Kopenhago-K.

- Danujo.
NEKRASOV (N. V.), ul. Gorjkogo, 113, kv. 1, Moskvo-47,
U. S. S. R.
NIŠIMURA (K.), ?
NYLÉN (P.), Gröna Villan, Huddinge, Stockholm,
Svedujo.
OKAMOTO (Jošicugu), 29, Yushima 6-chome, Hongco-ku,
Tokio, Japanujo.
PITLIK (D-ro A), Kremencová, 17, Praha II, Ĉeĥoslo-
vakujo.
PORTO CARREIRO NETO (D-ro L. da Costa), Rua 24-
de-Maio, 424, Rio de Janeiro, Brazilo.
PRIVAT (D-ro Edm.), Bellavista, Locarno, Svisujo.
RAKUŠA (Prof. R.), Ciril-Methodova, 18, Maribor, Jugo-
slavujo.
REED (S-ino Ivy Kellerman), 1707, Surrey Lane,
Washington, D. C., Usono.
ROLLET DE L'ISLE (M.), Rue du Sommerard, 35, Paris-
5e, Francujo.
ROTKVIČ (Ivo), Basarička st. 12, Zagreb. (Kroatujo),
Jugoslavujo.
ROÛSSEAU (C.), Rue Alfred de Vigny, 2, Bécon-les-
Bryères (Seine), Francujo.
RUBLÓV (S.), Per. Nekrasova 7, Odessa, U. S. S. R.
SALDANHA CARREIRA (J. A. de), Avenida Duque de
Loulé, 50 3º, Lisboa, Portugalujo.
SCHERER (Joseph R.), 4474 West Adams Blvd., Los An-
geles (Calif.), Usono.
SCHMID (J.), Müsliweg 2, Elfenau, Bern, Svisujo.
SCHOOR (Jan van), ?
SETÄLÄ (V.) Museokatu 40 A, Helsinki, Finnlando.
SEVAK GURGENO (Grigorjan), poŝtkesto, 78, Erivan. (Ar-
menujo), U. S. S. R.
SHAFER (F-ino Ad.), 45, Courthorpe Road, Hampstead,
London N. W. 3, Anglujo.
STAMATIADIS (D-ro A.), str. Rodou, 21, Ateno,
Grekujo
STOJAN (Petro), à Blausasc-Escarène (Alpes-Maritimes),
Francujo.
STROELE (G.), Maujobia 7, Neuchâtel, Svisujo.

- SZILÁGYI (D-ro F.), Box 698 (Eldona Societo de Espe-
ranto), Stockholm, I, Svedujo.
SUPICHOVÁ (F-ino J.), Malá Štěpánská 6, Praha II, Ĉeĥo-
slovakujo.
TSCHERNOCHVOSTOFF (G.), Idrottsgatan 22 A, 10,
Helsinki, Finnlando.
UITTERDIJK (D.), „Domo Zamenhof“, Hyacintenlaan, 1,
Hilversum, Nederlando.
WADHAM (F. E.), „Helmbury“, Woodcote Hurst, Epsom
(Surrey) (Anglujo.
WARINGHIEN (G.), 47, rue de Douai, Lille, Francujo.
WENGER (J.), Crêt Tacconnet, 28, Neuchâtel, Svisujo.
WIESENFELD (E.), Solna 1, Varsovio I, Polujo.
ZAMENHOF (F-ino Lidia), Królewska, 41, Varsovio,
Polujo.
ZON (Frato Wigbertus van), „Huize Steenwijk“, Vught
(Noord Brab.), Nederlando.
-
-

Lingva-Komitatoj laŭ la lingvoj kaj ilia elirjaro

Per la sekvanta listo ĉiu Landa Asocio (aŭ Societo) facile scios la elirjaron de la L. K.-anoj, kiuj reprezentas ĝian lingvon. Ĝi sekve povos ĝustatempe — t. e. ĉiujare *antaŭ la 1-a de Decembro* — sendi, al la Prezidanto de la L. K., proponojn por reelektado aŭ anstataŭigo de la koncernaj membroj.

La Centra Oficejo de U. E. A. same agos pri la reprezentantoj de lingvoj, en kies lando ne ekzistas Landa Asocio aŭ Societo.

La *elirjaro troviĝas antaŭ* la nomo de ĉiu membro. Post ĝi troviĝas — almenaŭ kiel eble plej komplete — sciigoj pri la jaroj: de la *naskiĝo* de la membro, de lia *Esperantistiĝo*, de lia *elekto en la L. K.-on* kaj, eventuale, de lia *elekto en la Akademion*.

Oni forigis el ĉiu jara nombro la *unuajn* du ciferojn, pri kiuj ne povas esti dubo.

La ceteroj metitaj inter krampoj post la indiko de ĉiu lingvo montras la nombron de ĝiaj reprezentantoj.

La *membroj, pri kiuj la informoj estas nekorektaj aŭ nekompletaj, estas petataj sendi precizajn informojn al la Prezidanto de la L. K. por la eldono de la venonta jaro.*

Angla (10)

— 40, Butler (84-05-22) — 40, Harvey (60-07-22) — 41, Baird (F-ino) (75-07-32) — 41, Wadham (02-21-32) — 42, Reed (S-ino) (77-06-10) — 43, Bailey (W.) (66-05-25) — 44, Kennigott (78-23-35) — 44, Scherer (01-22-35). 4/, Bailey (Th. G.) (72-07-29) — 47, Shafer (F-ino) (,,-,-,,-)

Armena (1)

41, Sevak (04-21-32).

Bulgara (1)

45, Krestanov (90-05-12).

Ĉeĥa (5)

39, Hromada (90-07-21) — 39, Pitlik (83-03-24) — 39, Šupichova (F-ino) (84-07-23) — 42, Kamaryt (83-00-,,) — 47, Kühnl (84-00-,,).

Ĉina (1)

41, Kenn (98-14-23).

Dana (2)

41, Blicher (84-07-16) — 44, Neergaard (07-25-35).

Estona (1)

44, Dresen (S-ino) (92-12-26).

Finna (1)

40, Setälä (92-06-21-30).

Flandra (1)

40, van Schoor (96-21-31).

Franca (17)

39, Bobin (75-03-98) — 39, Laignier (81-92-30) — 40, Boucon (56-98-05) — 40, Wenger (81-04-10) — 41, Archdeacon (63-08-32) — 41, Chavet (80-96-,,) — 41, Couteaux (84-04-32) — 41, Rollet de l'Isle (59 03-08-33) — 42, Rousseau (61-02-24) — 43, Bastien (69 02-09-34) — 43, de Lajarte (60-04-25) — 43, Deligny (64-00-33) — 44, Stroelé (79-05-12) — 44, Waringhien (01-17-26) — 45, Cogen (76-97-27) — 47, Esselin (60-04-29) — 47, Privat (89-03-09).

Germana (5)

39, Mincer (91-08-22) — 39, Schmid (69-05-09) — 40, Lippmann (95-08-23,,) — 43, Jung (92-10-33) — 44, Eliersiek (80-09-26).

Greka (1)

40, Stamatiadis (68-04-23-29).

Hebrea (3)

39, Lejzerewicz (01-13-23) — 40, Dreher (96-11-22) — 46, Mučnik (94-10-14).

Hispana (2)

39, Diez (89-06-21) — 40, Inglada (79-99-05-11).

Hungara (5)

39, Bodó (03-22-30) — 39, Szilágyi (95-24-30) — 40, Kalocsay (91-12-22) — 41, Cseh (95-10-32-34) — 46, Baghy (91-11-25,,).

Itala (3)

42, Bianchini (75-04-11) — 44, La Colla (89-05-27) — 46, Ghezzi (73-09-13).

Japana (3)

39, Nišimura (,,,-,,-) — 43, Kawasaki (02-19-33) — 43, Okamoto (00-19-33).

Kataluna (5)

40, Bremón (85-03-08) — 43, Dalmau (93-08-33) — 44, Grau Casas (96-15-26) — 44, Alberich-Jofrè (97-13-25) — 46, Bofill M. Granada (82-05-28).

Nederlanda (6)

40, Heilker (83-10-31) — 42, Bulthuis (65-01-10) — 43, Isbrücker (89-09-21-22) — 44, Van Zon (69-22-35) — 45, Blok (83-06-10) — 46, Uitterdijk (66-98-05).

Norvega (1)

41, Bugge-Paülsen (94-07-32).

Persa (1)

41, Jirkov (85-02-33).

Pola (8)

39, Wiesenfeld (92-12-22) — 40, Czubrynski (85-08-31) — 40, Hodakowski (03-26-30) — 43, Grenkamp-Kernfeld (96-11-25) — 43, Kostecki (93-08-25) — 44, Karolczyk (90-05-26) — 45, Zamenhof (F-ino Lidia) (,,,-,,-) — 46, Belmont (65-87,,,-).

Portugala (4)

39, Saldanha Carreira (86-14-30) — 40, Backheuser (,,,-,,-) — 41, Domingues (96-09-32) — 41, Porto Carreiro Neto (95-23-32).

Rumana (1)

42, Fischer (79-02-08).

Rusa — Blankrusa — Ukraina (9)

39, Andrejev (64-10-30) — 41, Mihalski (97-11-32) — 44, Tschernochvostoff (88-08-26) — 46, Drezén (92-10-28-kor. Ak. 29) — 47, Demidjuk (,,,-,,-) — 47, Hohlov (91-05-29) — 47, Nekrasov (00-15-29) — 47, Rublov (01-19-29) — 47, Stojan (84-03-10).

Serba-Kroata (1)

44, Rotkvič (01-21-35).

Slovena (1)

44, Rakuša (93-23-35).

Sveda (3)

41, Jansson (76-21-32) — 43, Nylén (70-92-05-08) — 45, Lundgren (70-03-13).

AKADEMIO

(Vidu la adresojn en la laŭalfabeta listo de la L.K.-anoj.)

Prezidanto: ISBRÜCKER.

Vic-Prezidantoj: BAGHY, GRAU CASAS.

Direktoroj:

Sekcio: *Komuna Vortaro*: W. BAILEY.

— *Gramatiko*: CSEH (provizore).

— *Teknikaj Vortaroj*: HELLEBOID, 10, rue Carnot, Viroflay (S.-et-O.), Francujo.

— *Kontrolo*: ROLLET DE L'ISLE.

Membroj: BASTIEN, BELMONT, INGLADA, LIPP-MANN, MINOR, NYLÉN, SCHMID, SETĀLĀ, STAMATIADIS, WARINGHIEN.

Gekorespondantoj: F-ino LIDIA ZAMENHOF (pola lingvo); DREZÉN (rusa); BACKHEUSER (portugala).

Akademianoj laŭ la Postenoj:

1. ISBRÜCKER; 2. (vakanta); 3. SCHMID; 4. LIPP-MANN; 5. ROLLET DE L'ISLE; 6. MINOR; 7. NYLÉN; 8. BELMONT; 9. (vakanta); 10. BASTIEN; 11. STAMATIADIS; 12. GRAU CASAS; 13. BAGHY; 14. INGLADA; 15. CSEH; 16. SETĀLĀ; 17. W. BAILEY; 18. WARINGHIEN.

MALLONGA HISTORIO DE LA LINGVA KOMITATO KAJ DE LA AKADEMIO

En la unua Universala Kongreso en *Boulogne-sur-Mer* (Francujo), en la jaro 1905, estis starigata „Komitato simple lingva, kun D-ro *Zamenhof* kiel prezidanto, por konsiliĝi kun li pri ĉiuj demandoj rilataj al la lingvo”.

Laŭ propono de D-ro *Zamenhof* mem estis elektataj 102 membroj el 26 nacioj, kaj Rektoro *Boirac* prezidis tiun Lingvan Komitaton.

En la dua Universala Kongreso, en Genevo (1906), D-ro *Zamenhof* petis, ke la L. K., kiu estis elektita provizore nur por unu jaro, restu kia ĝi estis, kiel definitiva komitato, kaj ke la Prezidanto konservu sian postenon.

En 1908, por forigi la malutilon de la granda nombro de la L.K., la Prezidanto proponis apartigi en ĝi Superan Komisionon aŭ *Akademion* el 18 membroj. Ili estis proponataj de si mem aŭ de la Prezidanto; 12 estis elektataj de la L. K., nome: *Boirac*, *Bein*, *Cart*, *Grabowski*, *Mochi*, *de Saussure*, *Nylén*, *Mybs*, *Villanueva*, *Ellis*, *Evsstifejff*, *Wackrill*.

La Prezidantoj de la L. K., kiuj ankaŭ prezidis la Akademion, estis Rektoro *Boirac* (1908-1917), Profesoro *Cart* (1917-1931), S-ro *Warden* (1931-1933), S-ro *Rollet de l'Isle* (1933-1937).

La Regularo de la L. K. estis starigata en 1908 de la membroj, laŭ propono de la Prezidanto; kelkaj malgrandaj sanĝoj estis enkondukataj en 1912.

En 1908 estis kreaĵoj konstantaj komisionoj, nomataj Sekcioj de laboro, por *Komuna Vortaro*, *Gramatiko*, *Teknika Vortaro* kaj *Internaj aferoj*; tiu lasta ne plu ekzistas.

La Sekcio *Komuna Vortaro* estis unue prezidata de Prof.

Cart; en 1912, ĝi fariĝis Sekcio pri Vortaro, kun du subsekcioj: *Komuna lingvo*, direktata de S-ro *Elb*, kaj *Teknika lingvo*, de S-ro de *Saussure*; post la morto de S-ro *Elb* en 1913, Prof-ro *Grosjean-Maupin* fariĝis direktoro de la Sekcio *Komuna Vortaro* kaj la Sekcio *Teknika Vortaro* fariĝis sendependa sub la direkte de S-ro *Vérax*.

La Sekcio *Gramatiko* estis unue prezidata de S-ro *Grabowski*, kaj poste, en 1924, de D-ro *Lippmann*.

La Sekcio *Teknikaj Vortaroj* estis unue prezidata de S-ro de *Saussure*, kiu fondis en Genevo *Sciencan Oficejon*, kies celo estis kolekti verkojn de sciencistoj; ĉiujare devis esti publikigata listo de faritaj vortoj; sed jam en 1909 mono kaj tempo mankis por tiu publikigado. S-ro de *Saussure* proponis krei *Akademian Komisionon* por oficialigi la vortojn proponitajn de *Teknika Komisiono*, kiu ankaŭ donus konsilojn al la vortfaristoj. S-ro *Rollet de l'Isle*, elektita direktoro de tiu ĉi komisiono, organizis ĝin, kaj en 1910, aperis, en *Scienca Revuo*, la „Konsilare por la farado de la Teknikaj Vortoj”. Poste aperis *Kemia Nomenklatur* kaj parto de la *vortaroj de Kemio, Fiziko kaj Mekaniko*. En 1920, D-ro *Corret* estis elektata direktoro de „*Sekcio pri sciencaj kaj teknikaj vortaroj*”; li, pro troa okupiteco, estis anstataŭata, en 1922, de S-ro *Rollet de l'Isle*.

En 1934, estis kreata *Sekcio de Kontrolo*, kies tasko estas kontroli la evoluon de la lingvo: la unua direktoro estis S-ro *Rollet de l'Isle*.

El la publikigitaj verkoj de la Akademio estas citindaj: *Zamenhofaj vortoj*, kolektitaj de S-roj *Wackrill* kaj *Boulet*, publikigitaj en broŝuroj aŭ en „*Oficiala Gazeto*” (1906):

Propraj nomoj, elektitaj de S-ro *Bein*, *Schröder* kaj *Moch*, publikigitaj en „*Oficiala Gazeto*” (1909):

Korekto de eraraj tradukoj en Universala Vortaro, publikigitaj en broŝuroj, rilataj al la angla, franca, germana, pola kaj rusa lingvoj:

Oficialaj Aldonoj al la Universala Vortaro aperis en apartaj broŝuroj aŭ en „*Oficiala Gazeto*”. Jam en 1906, S-ro *Huet* estis komisiita por kolekti la radikojn aldonotajn al la U. V. La unua aldono (1909) aperis en „*Dokumentaro de la Centra Oficejo*”; ĝi entenis 800 radikojn. La dua (1909), 312 radikoj, kaj la tria (1922), 200 radikoj, aperis en „*Oficiala Gazeto*”. La kvara (1929), 122 radikoj, aperis en „*Oficiala Bulteno*”. La kvina (1934), 8 radikoj, kaj la sesa (1935), 21 radikoj troviĝas en la jarlibro de 1936. La nombro de la oficialaj radikoj estas nun ĉirkaŭ 4.000.

Vortaro de la Oficialaj Radikoj, publikigita en 1922, redaktita de Prof-oj *Cart* kaj *Grosjean-Maupin*;

Oficiala Klasika Libro de Esperanto, entenanta ĉiujn oficialajn radikojn kun nacilingvaj tradukoj. En 1924, aperis la tradukoj angla, franca, germana; en 1927 la tradukoj itala, hispana, portugala; ĉirkaŭ 2850 vortoj kaj 1.200 radikoj ĝenerale kompreneblaj de eŭroplingvanoj.

Kolekto de la Akademio. Tiuj ĉi publikigaĵoj konsistigas la kolekton de la Akademio.

Por sciigi pri siaj agoj kaj decidoj la Akademio publikigis, de 1929, *Oficialan Bultenon*; aperis ses kajeroj. En 1934 tiu bulteno estis anstataŭata de periodaj cirkuleroj titolitaj *Oficialaj Sciigoj de la Akademio*.

NORMIGITAJ NACIAJ DIPLOMOJ

(Vidu paĝon 17 en la Jarlibro 1936)

(Post ĉiu ekzameno, la litero inter krampoj montras la respondan norman diplomon: E = elementan; S = superan; K = klerecan; I = instruan).

Aŭstrujo	<i>Ŝtataj ekzamenoj</i> : atesto pri scipovo de Esp. (E); atesto pri instrua kapableco (I), (provizore ne povas okazi).
Belgujo	Ekzameno pri profesora kapableco (I).
Britujo	<i>Ekzamenoj de B. E. A.</i> : elementa atesto (E); supera ekzameno, diploma atesto D.B.E.A. (S); licenciata diplomo L.B. E.A. (K); instruista diplomo (I). <i>Ekzamenoj de Royal Society of Arts</i> : elementa (E); meza (S).
Ĉeĥoslovakujo	Ekzamenoj: pri scio de Esp. (E); pri kapableco instrui Esp. (K, I); oficiala ekzameno (S, I).
Estonujo	Ekzamenoj: pri kapableco (E); pri scienca kapableco (S); pri scienca pedagogia kapableco (I); pri kapableco por kursvidado (I).
Finlando	Elementa diplomo (E); supera diplomo (K).
Francujo	Atesto pri lernado (E); supera atesto pri lernado (S); atesto pri instru-kapableco (I); diplomo pri altaj esperantaj studoj (K, I).
Germanujo	Ekzamenoj: pri kapableco (E); pri kapableco kaj kursgvidado (I); pri pedagogia kapableco (S, I); pri scienca kapableco (K), (provizore ne povas okazi).

Grekujo	Atesto pri studado (E); atesto pri lingva kapableco (S); profesora diplomo (K, I).
Hindujo nederl. (Javo)	Atesto pri lernado (E); diplomo pri kono (S); diplomo pri kapableco (S, I).
Hispanujo	Atestoj: pri elementa kapableco (E); pri supera kapableco (S).
Hungarujo	Ekzamenoj: parola (E); kursgvida (S, I).
Katalunujo	Atesto pri lernado (E); diplomo pri profesoreco (I).
Nederlando	(Nederlanda Esperanto-Ekzamena Komitato, oficialigita) A-diplomo: (E); B-diplomo (I). (Ĝenerala Esperanto-Ekzamena Komitato). A-diplomo: (E); B-diplomo (I);
Norvegujo	Ekzamenoj: elementa aŭ unuagrada (E); supera aŭ duagrada (S).
Svedujo	Ekzamenoj: elementa (E); supera (S), kaj eventuale instrua pri elementaj kursoj (I); instruista por ĉiuj kursoj (I).
Svisujo	Atesto pri lernado (E); supera diplomo (S, I).
Usono	Atestoj: pri lernado (E); pri kapableco (S); pri instruado (I).



